



# KVINPETALO Esperanto-Centro

15 rue du Lavoir - FR 86410 Bouresse

☎ 33 (0) 549 03 43 14

💻 [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org) - <http://www.kvinpetalo.org>

## ALIĜILO

Familia nomo : ..... Persona nomo : .....

Virino  Viro

Naskiĝdato : ...../...../..... Nacieco : .....

Adreso : .....

.....

Telefono : ..... Poŝtelefono : .....

Retadreso : .....

Mi enskribiĝas en la staĝo de la ..... ĝis la .....

Titolo de la staĝo : .....

Mi deziras trapasi la jenan ekzamenon

.....

.....

**Utilaj informoj** : tago kaj horo de la alveno (ĉu necesas, ke iu venu preni vin ĉe la stacidomo de Lussac les Châteaux), speciala dieto, ktp .....

.....

.....

Partopreno en la staĝoj supozigas aligon al la asocio :

Jam aliĝinta : **jes**  **ne**  Aliĝo : 12 € (jare civila jaro) Dumviva membro (120 €) **jes**

### Tarifoj

Tritaga staĝo : 120 € (kun manĝa gastigado)

Kvintaga staĝo : 180 € (kun manĝa gastigado)

Muzika staĝo (9-taga) : 260 € (kun manĝa gastigado)

Kromaj tagoj : po 10 € sen aliro al la kuirejo

Duona tarifo por la infanoj de 4 ĝis 12 jaroj.

En .....

La .....

### Subskribo

(por la neplenkreskuloj,  
la subskribo de la gepatroj estas deviga)

Por validigi vian enskribiĝon, bonvolu sendi :

Aliĝilon plenigitan, datumitan, subskribitan (po unu por ĉiu partoprenanto)

Pago de 30 € por ĉiu partoprenanto (ne redonebla, okaze de malaliĝo)

Nur 15 € por la enskribiĝoj ricevitaĵ pli unu monato antaŭ la komenco de la staĝo.

# PROGRAMO 2011

## Junio 11a-13a: **Vigligo de regiona Esperanto-agado kaj ĝenerala membrokunveno de Esperanto Poitou-Charentes**, kun Marie-France Conde-Rey

Dum tiu ĉi semajnofino estos interŝanĝitaj spertoj pri regiona agado (kursoj, budoj, organizado de publikaj eventoj), kaj pridiskutitaj perspektivoj por plifortigi ĉi tiujn aktivaĵojn per interhelpo inter diverslokaj aktivuloj. La celo estas prioritare plifortigi esperanto-movadon en Piktavio, sed spertoj el aliaj regionoj ankaŭ estos bonvenaj.

## Julio 5a-9a: **Esperanto kaj Turismo**, kun Catherine Kremer

Catherine Kremer, profesia ĉiĉeronino, celas igi ĉiujn volontulojn kapablaj gvidi ekskurson klare kaj agrable. La partoprenantoj ampleksigos la prezentadon: ili kunportos turisma(j)n dokumento(j)n aŭ foto(j)n rilate regionon, urbon aŭ monumenton. Ĉiuj provos trovi la ĝustan manieron prezenti ĝin (ilin), per la plej trafaj vortoj. Ni amuziĝos (espereble) inter historio, arkitekturo, anekdotoj, priskribante, rakontante eĉ tradukante se bezonate.... Surloke, ni provos dum ekskurso finkonkretigi tiun kurson sen forgesi ke "Eksurso ne estas Kurso" !

## Julio 18a-23a: **Praktikado de la lingvo (2a grada nivelo)**, kun Josée Lafosse

Aktivulino el Tuluzo, Josée Lafosse delonge instruas Esperanton pere de Freinet-metodo.

## Julio 18a-23a: **Praktikado de la lingvo (komencantoj)**, kun Christophe Chazarein

Christophe Chazarein, aktivulo en la Esperanto-Kulturcentro de Tuluzo, restadis dum unu jaro en Bjalistoko kiel eŭropa volontulo kaj estis trejnita kiel Esperanto-instruisto en la universitato de Poznano. Ekde 2006, li regule instruas Esperanton.

## Aŭgusto 9a-13: **Tradukado altnivela**, kun Brian Moon

Brian Moon estas tradukisto ĉe la Eŭropa Komisiono kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

## Aŭgusto 16a-20a: **Biblioteka ordigado**, kun Philippe Cousson

La riĉenhava biblioteko de Kvinpetalo bezonas ordigadon. Tion organizos Philippe Cousson, profesia bibliotekisto.

## Aŭgusto 16a-24a: **Muzika Staĝo**, kun Markov-familianoj

Dum tiu ĉi staĝo esperanto estos praktikata pere de muziko: libera aŭ plurvoĉa kantado, orkestra muziko, kaj diskutoj pri la kreokunteksto de la prilaborataj verkoj, paralele kun unuagrada kurso por komencantoj. La staĝo finiĝos per koncerto, sub la gvido de Lino Markovo, profesia muzikisto.

## Oktobro 10a-14a: **Malkovri la Esperantan literaturon**, kun Anne Jausions

Anne Jausions estas diplomita pri Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz, en Poznan. Ŝi proponas al vi promenadon tra la originala Esperanto-literaturo: « *Mi parolos pri kelkaj klasikuloj, kaj pri nuntempuloj, kiujn mi ŝatas. Temo ĉefe pri eŭropaj verkistoj, kaj mi diros nur kelkajn vortojn pri azianoj.* » Partoprenantoj, kiuj havas emon pri tio, estas invitataj fari kelkminutan intervenon por prezenti libron, kiun ili ŝatas. La kurso estos okazo por viziti la riĉan bibliotekon de Kvinpetalo, kaj trafolumi diversajn librojn.

## Oktobro 25a-29a: **Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj**, kun Michel Dechy

Michel Dechy aŭtoris ĵus eldonitan perbildstrian lernolibron de Esperanto. Li ankaŭ iniciatis la tradukon de Tinĉjo en Tibeto.

## Oktobro 25a-29a: **Neperforta komunikado**, kun Bernard Lagrange